15 NOVEMBRO 1908 Unu Numero : 15 CENTIMOJ (6 Spesdekoj) KVARA JARO. – N 43

★ ESPERANTO ★

OFICIALA ORGANO DE LA ★ UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ★

Duonmonata Internacia Gazeto

ABONO

Unu Jaro . . . . ₷. 1.60 (4 frankoj).

Oni abonas ĉe la Administrejo
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO

1 paĝo . . . . ₷. 100.– ‖ ¼ kolono . . . ₷. 7.–
1 kolono . . . . » 25.– ‖ ⅛ » . . . . » 4.–
½ » . . . . . » 13.– ‖ 1/16 » . . . . » 2.50

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : G. Warnier, 15, Rue Montmartre Paris-2e
C. A. G. Browne, 20, Wellington Str., London W. C.

Nia Nombro

Dum nia esperantista agado, ofte venis al ni el la organizajoj esperantistaj, de kiuj ni petis kunlaboron por difinita celo, la respondo ke la mulmulteco de la lokaj Esperantistoj neebligas ĉian agadon kaj antaŭ ĉio estas necesa atendi ĝis granda parto de la publiko estos varbita al nia afero ; poste oni partoprenos en internacia agado. Al ni ŝajnas, ke tiu rezonado estas kaŭzata de la erara ideo, ke la multnombreco estas la sola kondiĉo de la venko, dum ĝi en la realeco estas nur unu el la kondiĉoj, kaj ne la precipa. En ĉia movado kiu, kiel nia, bezonas per sia propra forto sin trudi al la publiko, estas necesa antaŭ ĉio serioza kaj forta organizo, dank'al kiu ĉiuj varbitaj elementoj povos esti taŭge uzataj kaj ĉiu el ili povos interŝanĝe de sia aliĝo ricevi ian utilon.

Por ĉi tio ni ne bezonas atendi ĝis la plej granda parto de la homaro estos esperantistigita ; tute ne estas absolute necesa, ke en ĉiu loko ekzistu granda aro de varbitoj, ĉefe se la loĝantaro de tiu loko ne estas tuj senpere interesata en la internacia vivo. Sufiĉas aro de kelkaj homoj, konsciantaj pri la graveco de la ideo por kiu ilin laboras, kondiĉe ke tiuj homoj ne restu en rondo apartigita for la aliaj, sed estu en konstantaj rilatoj kun aliaj centroj, ke tiuj rilatoj ne estu io konfuza kaj malpreciza, sed organizita interŝanĝado praktika kaj materiala. Samtempa, internacia agado kun relative malgranda nombro da homoj, multe pli efikas ol disa, loka agado de multegaj centroj, kiuj laboras ĉiu laŭ malsama plano aŭ tro ofte tute ne laboras.

Kion signifas agado ? ĉu konstanta predikado pri eventuala signifo de nia movado ? Ne, ĝi signifas konstantan realigon, senĉesan materiigon, eĉ en komence tre modesta formo, de tio, al kio ni celas. Por kio servos Esperanto en la estonteco, se ne por sennombra ĉenaro de la plej diversaj servoj inter homoj de malsamaj lingvoj kaj nacioj, servoj similaj al tiuj, kiuj dank'al lingvo kaj organizo solidarigas en sama nacio homojn de malsamaj regionoj. Ni do kreu la skeleton de tiuj servoj, uzante la ĝisnunajn varbitojn kaj dank'al tiuj servoj varbante antaŭ ĉiu tiujn homojn, kiuj povos nun ilin uzi. Por tiu laborado ni bezonas en ĉiu loko areton de konsciaj samideanoj ; popolamasoj venos poste, kiam ili konstatos, ke tiuj servoj utilas al la jamaj varbitoj. Pli tuje grava ol la multnombreco de samideanoj en sama loko estas la multnombreco de la la lokoj, kie ekzistas kunlaborantoj, tio estas Esperantistoj apartenantaj al la sama internacia organizajo, ĉar ili estas tiom da fokusoj de elradianta Esperantismo, kiel pruvis la sperto, kaj ju pli ekzistos da lokoj kie diskoniĝas Esperantismo, des pli tio fortike enradikigos nian movadon, ĉar ĝi jam ne dependos de unu aŭ kelkaj centroj, sed de multegaj el ili intime kunligitaj. Grava estas ankaŭ, ke la varbitoj apartenu kiel eble plej al la tujaj interesatoj. Dek personoj, kiuj lernas Esperanton kaj ĝin uzas por difinita celo, per ĝi rilatiĝas kun alinacianoj, multe pli valoras, el la vidpunkto de nia venko, ol la centoblo, kiu lernas Esperanton ĉu por amuzi, ĉu por ĝin diskuti. Jen kondiĉoj pli gravaj ol nura loka multenombreco, kiu estas konsekvenco de la aliaj. Eĉ se ni estus tre multenombraj, tio malmulte utilos, se ne ekzistas precizaj rilatoj kaj servoj inter niaj varbitoj : ĉiujare tre multaj junuloj lernas latinan lingvon ; sed ĉar per ĝi estas organizita nenia servo, ĉar aliflanke tiu lingvo respondas nun nenian internan senton kaj idealon de ĝiaj lernantoj, ĝi el praktika vidpunkto, por ne paroli pri la celeraj, utilas absolute al nenio. Esperanto sekvus saman vojon, se ni ĝin lernus, sed ne uzus, se aliparte ni perdus la konscion pri la gravaj ideoj, kiuj estas intime alligitaj kun ĝi.

H. H.

TRA LA MONDO

AŬSTRIO

Praha, Novembro 1908.

Anekso de Bosnio ; manifestadoj ; ministrara krizo ; nacia batalo.

⁂ La impreso, kiun faris ĉe ni la anekso de Bosnio kaj Herzegovino, estis diversa laŭ la naciaj kaj politikaj partioj ; sed ne tiel malsimila, kiel oni estus atendinta ; ĝenerale ĉiu konsentas en tio, ke la okupado ne povis praktike finiĝi alie, ol per la anekso. Sed la afero estas ankaŭ tre serioze diskutata laŭ vidpunktoj morala, nacia kaj jurista kaj ĝenerale oni povas diri, ke laŭ ili ĉiuj slavaj nacioj kaj ĉiuj socialistoj, do la granda plimulto da loĝantaro, tre malaprobas la anekson. Ili prave atentigas, ke la anekso ne devis fariĝi tuj per imperiestra dekreto, sed ke la registaro devis fari balotadon de Bosnia loĝantaro pri ĝia sorto kaj la „ plebiscitum ", kiu laŭ certigo de optimistoj certe estus estinta favora por Aŭstrio, povis fariĝi argumento de la anekso. Estas nenia kaŭzo ĝojegi. Oni ne devas forgesi, ke Serboj havas certe pli multe da natura rajto je Bosnio kaj Herzegovino ol Aŭstrio. Sed Serboj estante pli malfortaj pro historia evolucio devas obei rajton de la pli forta kaj de la neceso. Estas vera fakto, ke Aŭstrio havas nenian juran titolon por Bosnio ; ĝi prenas ĝin simple per potenco ; ĝi havas por si sole la argumenton, ke la okupado, kiu daŭris 30 jarojn kaj kostis multajn oferojn je vivoj kaj mono, ŝajnis resti sen fino. Sed tio absolute ne estas argumento por rompi internaciajn kontraktojn Sed tiaj diskutoj havas malmultan praktikan valoron ; estas plej saĝe atendi la fakton neforigeblan. La imperiestra dekreto promesis al aneksitaj landoj konstitucion ; estas do devo de la imperiestraj deputitoj, precipe slavaj, zorgi, ke leĝoj de nove konstruota konstitucio Bosnia ne subpremu Serbojn kaj Kroatojn tie loĝantajn.

Aŭstrio nur devas per laboro fariĝi meritanta legitimadon moralan por tio, kion ĝi estas farinta : kaj tio povas fariĝi sole per tio, ke ĝi faros la loĝantaron sen diferenco de religio kaj nacieco vere feliĉan kaj kontentan per enkonduko de vera libereco kaj forigo de polica regado, kiu ĝis nun tie regis. Per anekso de Bosnio Aŭstrio despli multe estas interesata je la sudslava problemo kaj ĝi devas de nun serioze peni, ke ĉiuj sudslavaj nacioj estu kondukataj al komuna laboro por profito de siaj landoj, kaj ne fari en la slavaj landoj propagandojn katolikan, magiaran aŭ germanan.

⁂ Sed la publika intereso por la anekso baldaŭ estis dividita al intereso por naciaj bataloj. Du gravaj ĉefurboj slavaj nome blanka Ljubljana kaj reĝa Praha fariĝis scenejoj de manifestadoj kontraŭgermanaj En Ljubljana (Laibach) la slovincoj manifestis kontraŭ germanoj ; du slavincoj estis dum tio mortigitaj per soldataj pafoj Sed baldaŭ sukcesis al la simpatia urbestro Hribar renovigi la trankvilon kaj la strataj manifestadoj finiĝis per tio, ke slavincoj komencis are elpreni siajn deponitajojn el granda germana ŝparkaso kaj enmeti ilin en financajn institutojn slavincajn.

En Praha komencis la manifestado pro tio, ke germanaj deputitoj kaŭzis per sia obstrukco forpermeson de la bohema provinca parlamento. Per tio ili neebligis ŝanĝon de la balotsistemo por nia provinca parlamento en senco de universala balotrajto Ĉiuj germanaj deputitoj kontraŭstaras ian ŝanĝon de la balotsistemo, ĉar ĝi certe ĉiaokaze malgrandigos ilian nun nelaŭproporcie grandan influon je la bohema parlamento. La forpermeso de la parlamento kaŭzis ministraran kkizon, ĉar ambaŭ ĉeĥaj ministroj Fiedler kaj Prašek eksiĝis je siaj oficoj. Multaj ĉeĥaj deputitoj minacas, ke ili rekompencos la germanan obstrukcon en bohema parlamento per obstrukco en parlamento imperia. Sed tion tre kontraŭstaras socialdemokratoj de ĉiuj nacioj, ĉar ili volas, ke la parlamento tuj komencu labori pri leĝoj de grava socia signifo precipe pri la deviga asekuro por maljunaj kaj invalidaj laboristoj.

Estas malfacile profeti, ĉu sukcesos al konata lerteco de ĉefministro Beck ankoraŭ iom kvietigi la naciajn batalojn, sed estas duba. La nuna ekflamo de batalo german-ĉeĥa ne estas momenta, sed ĝi estis preparata jam dum unu jaro, depost la enkonduko de la universala balotrajto, kiu tre malgrandigis la potencon de germanoj en Aŭstrio. La batalo germanĉeĥa estas tiel malnova kiel nia konstitucio kaj nenio povas ĝin baldaŭ forigi. Nek la divido de regno Bohemujo, postulata de germanoj, nek ia leĝo, proponata de s-ro Beck ordonanta la limojn de uzado de lingvoj ĉeĥa kaj germana ĉe oficoj en regno Bohemujo, povos silentigi la batalon ; ĉar natura evolucio de la ĉeĥa nacio pri sia esenco ne povas esti haltigata per ia leĝo kaj, kion hodiaŭ donos la imperia parlamento al ĉeĥoj, ĉeĥoj neniam povas akcepti, ĉar jam morgaŭ estos malmulte por ilia ĉiam kreskanta signifo kaj potenco ekonomia kaj politika. kaj kion ĉeĥaj volas, la parlamento ankoraŭ ne volas doni, ĉar ĝi ŝajnas tro multe por hodiaŭ, kaj nia parlamento ne amas kalkuli kun morgaŭ.

Sed ne estas bezone rigardi la situacion tragedie. Kulturo povas sole gajni per kresko kaj fortiĝo de nova nacio, kaj por germanoj tamen estos nenia malutilo, se estos ekzemple ĉeĥa universitato en la ĉefurbo de Moravio aŭ ĉeĥa publika popola lernejo en Wien, aŭ se en ĉefa strato de Praha nefaros « buml » studentoj de la germana universitato en Praha, kiuj kun fervoro kaj multo nevidebla en aliaj urboj, malfaciligas ĉiudimanĉe la pasadon en la plej granda strato de la urbo promenante en longaj vicoj sur promenejo. La manifestadoj en Praha, kiuj verdire ne estis tiel grandaj, kiel ilin pentras multaj jurnaloj malbone informitaj (eĉ la tre serioza kaj progresema „ Frankfurter Zeitung ") okazis precipe pro tio, ke la polico, pro nekonata kaŭzo, ne volis malpermesi tiujn arajn promenadojn, kiuj tre kolerigas la popolon de Praha. Estas bezone scii, ke en Praha kun la antaŭurboj estas nur 2 % da germanoj, kaj ke la loĝantaro estas fiera je tio, ke Praha estas ĉeĥa urbo Do nenia miro, ke la popolo kontraŭ konsiloj de ĉiuj seriozaj jurnaloj kaj korporacioj estas kolerigata per germana propagando, kiu estas farata ne nur per la promenadoj de germanaj studentoj portantaj germanajn insignojn, sed ankaŭ per kantado de la himno : « Wacht am Rhein ». Simpla polica malpermeso de la « bumloj » donas la kvieton al la urbo. La dimanĉon 1an de novembro estis jam kvieto en Praha sed ĉu ĝi estos daŭra, oni ne scias. La germanoj en bohemujaj urboj kun la germana plimulto „ rekompencas " la manifestadojn de Praha per manifestadoj kontraŭ tie loĝantaj ĉeĥoj. Sed ne kredu, ke la manifestadoj ĉe ni estas iel tro danĝeraj. Tiaj manifestadoj okazas en ĉiuj grandaj urboj por kaŭzoj pli malgrandaj kaj neniu timas viziti la urbojn.

S. K.

⁂

Gratz, Novembro 1908.

Ĉie en la civilizita mondo oni nun parolas pri Aŭstrio-Hungarujo ; kion oni jam de longe ne faris, ĉar la pli frua ministro de la eksteraj aferoj grafo Goluchowski faris tre singardeman politikon kaj neniam iel ofendis ian ajn grandpotencon. Sed depost la barono Aehrenthal fariĝis ekstera ministro ŝanĝiĝis la afero. Li faris tre ageman politikon. Dume oni pli frue preskaŭ ne plu sciis ke Aŭstrio ekzistas, nun oni restariĝas ĝian aŭtoritaton en koncerto de eŭropaj grandpotencoj. Nia lando estas hodiaŭ aktiva kaj ne plu pasiva. Tial oni ankaŭ ne povis plu nur rigardi kiel oni propagandis en nia lando grandan Serbujon. Partio nome disvastigata en Serbujo, Bosnio-Herzegovino kaj eĉ Kroatujo kaj Slavonujo revis pri unuiĝo de ĉiuj Serboj en unu grandan regnon „ Grandserbujo ". Aŭstroj okupis en 1878 Bosnion-Herzegovinon laŭ decido de la konata Berlina kongreso kaj devis batali grave kaj forte, ĉar la enloĝantoj ribelis kontraŭ la okupado

En tiu batalo falis la filoj de nia patrujo kaj ilia sango. De tiu tempo Aŭstrio regadis en tiu lando, konstruigis stratojn, fervojojn, starigis lernejojn superajn kaj malsuperajn, pacigis tiun ĉiam ribeleman landon kaj alkondukis ĝin al la civilizacio, laŭeble nature ; ĉu iu kredis ke ni fordonis nian sangon, nian monon, nian laboron de tridek plenaj jaroj nur por ke alia ĝoju pri la plibonigita lando kiam li ĝin ricevis. Ne, neniam. La monon oni povus redoni al ni, la laboron oni povus pagi, sed la sangon de niaj patroj kaj filoj oni neniam povus pagi, nek la civilizacion kiun ni eŭportis en la landon. Ni neniam povus fordoni ĝin, kiun ĉiu Aŭstriano jam sentis la sia. Nun oni enkondukis en Turkujo la parlamentarismon. Bosnio Herzegovino estis laŭnome parto de Turkujo ; ĉu oni sendas delegitojn de ĝi en la parlamenton en Konstantinoplo ? Ne, la lando estas Aŭstria ; ĝi ne plu povas rekoni la aŭtoritaton de l'sultano pri tiu. Sed Aŭstrio devis ankaŭ kontentigi la anojn de tiu lando ; ĝi ankaŭ devas doni al ili reprezentantaron. Sed tio estis nur ebla kiam oni tute klare sciis, al kiu apartenas la lando. Kaj tion nia monarĥo elparolis, li elparolis kion ĉiu en Aŭstrio, ja ĉiu en la mondo jam sciis kaj kion ni jam interne sentis. Li diris ankaŭ kaŭzojn. Neebligi la propagandon de Grandserbujo kiun nutris la duba situacio de la du landoj, kaj ebligi konstitucion por ili. — Kiu rajtas enmiksi sin kiam la lando mem kiun koncernas la anekso estus kontenta ? Eble nur Turkujo, ĉar tiu perdis ion, se eĉ nur ŝajnon. Grandanime Aŭstrio donas pli ol ĝi prenas ; ĝi donas interŝanĝe la okupadrajton en Limlando kaj Novibazar. — Sed kiu kriadas nun pli laŭte ? Ne la Serboj de Bosnio, sed la Serboj en Serbujo, kiuj neniam havis ian eĉ nur ŝajnan rajton en Bosnio. Li vokas ; ni batalu kontraŭ Aŭstrio ? Sed Aŭstrio estas tute trankvila, sen ia malkvieto, ni esperas ke la racio venkos en Serbujo kaj Turkujo. Nun Turkujo (kiel oni jam diris) ricevis pli ol ĝi perdis. Sed tamen la registaro estas jam tre kolerigita. Precipe la junturka partio timas malgrandiĝon de sia aŭtoritato kaj tial oni aranĝis manifestadojn kontraŭ Aŭstrio. Ili jam ĉesis, sed oni komencis alian batalon, oni proklamis la bojkoton. Kvankam tio estas senteble malagrabla por ni, ni tamen ne timas, ĉar « Oni ne manĝas ion tiel varmegan kiel oni ĝin kuiras.

Laŭ la lastaj sciiĝoj oni jam amike interagadas.

R. F.

BOSNIO

Sarajevo, Novembro 1908.

Okazintaĵoj en Balkano

⁂ Unua landestro en Bosnio-Herzegovino estos F. Z. M. Varešanin, el Vareš. Tiu ofico estas al li proponita de la komuna regado de Aŭstrio. La ofica proklamo okazos post la imperiaj delegitaroj.

La disputantaj monarĥoj komencas repacigeme kontraktadi. Turkujo per helpo de imperiestro Vilhelmo IIa volas atingi interkonsenton. Kontraŭ bojkoto de Aŭstria komerco en Turkujo estis faritaj provizoraj antaŭgardoj. Tiu bojkoto cetere plej multe estos farita de Hungaroj en Stambul. Antaŭ kelke da tagoj la liberala partio de ortodoksuloj havis konferencon en Sarajevo, kaj decidis sendi adreson al lia imperiestra moŝto. Tre grava ankaŭ estos nun la demando, al kiu apartenos Bosnio-Herzegovino. Unuigitaj partioj de Kroatoj kaj Turkoj volas, ke Bosnio estu kiel lando de Kroatia regno, aliaj ke ĝi restu libera lando en imperio de Aŭstrio. La solvado estos longa. Memkompreneble, Hungarujo ne restis malantaŭe ; jam hungara ministro de instruado grafo Apponyi antaŭ siaj voĉdonantoj propriĝis Bosnion kiel landon de hungara regno- En Kroatio (Agram) estis malkovrita konspiro. Multe da homoj diversreligiaj estis malliberigitaj. Ankaŭ la vaporŝipo „Ceremić" en Budapeŝto, kiu transportis municiojn Serbujon konfiskiĝis. Gazeto „ Sebska rieć" eldonis specialon eldonon pri aneksado kaj tuj konfiskiĝis.

⁂ Sro-Dro N. Mandić, kondukanto de Kroata partio, revenis kun Kroata deputitaro el Vihro en Sarajevon. Multe da Kroatoj iris renkonti lin stacidomon por ovacio.

⁂ En la Delegitaroj kunvenintaj en Budapeŝto, barono Burian faris longan paroladon pri aneksado kaj aludante pri Bosnio, diris ke la deziroj de ĉiuj partioj estos plenumataj, sed nur ĝis tia grado, kian postulas la interesoj de monarĥio koj situacio de Bosnio. La leĝdonado postulas antaŭ ĉio kompletigon de l' punordo. Ekziladon, konfiskadon de proprajo oni malpermesos ; soldataj kaj publikaj juĝoj estos apartigataj ; rajto de societoj kaj kunvenoj estos preparita. En baldaŭa tempo estos enkondukita organizo de landa reprezentantaro kaj balotleĝo. Tiu reprezentaro povos okazi en la estonta printempo.

Fr. Čech.

RUSUJO

Dorpat, Novembro 1908.

La jubileo de grafo Leo Tolstoj ;
El studenta vivado.

⁂ Dum la lastaj monatoj du gravaj okazintaĵoj altiris la atenton de granda rusa societo — tio estas — la jubileo de mondfama verkisto Leo Tolstoj kaj „ Studentaj okazintaĵoj ".

La 28an de aŭgusto, Rusujo festis jubileon da 80 jaroj de tagnaskiĝo de grafo Leo Tolstoj. Tiun ĉi tagon la rusa gazetaro notis dediĉinte siajn numerojn al jubileanto...

Gis plej lasta tempo la grafo ĉiutage ricevas „ salutojn " de ĉie kaj de plej malsamaj homoj kiel de la Rusoj tiel de la eksterlanduloj... Sendis salutojn diversaj societoj sciencaj, pedagogiaj Universitatoj, apartaj homoj, pastroj kaj multaj vilaĝanoj !... Ni ekdeziru tutkore al aŭtoro da multaj senmortaj verkoj ke lia potenca voĉo sonos ankoraŭ dum multaj jaroj je bono kaj je feliĉo ne nur de la Rusoj sed ankaŭ de tuta homaro...

Alia okazintajo — kiu altiris atenton de rusa societo — tio estas tutrusuja studenta striko direktita kontraŭ politiko de rusa ministro de popola instruado S-ro Svarc, kiu per siaj cirkuleroj forprenis studentan kaj profesoran memregadon per leĝo de 27a aŭgusto 1905 jaro...

La rusa studentaro dezirante defendi sian memregadon faris strikon, nehavante alian rimedon de batalo kontraŭ la ministro. La studentaro petegis interalie studentan memregadon, liberon de societoj, rondoj sciencaj, liberon de kolektiĝoj, permeson por virinoj eniri en universitatojn, k. t. p.

Interalie oni devas noti ke virina movado komencas kreski forte ankaŭ en Rusujo. Rusaj progresemaj virinoj dum plej proksima tempo faras unuan rusan virinan kunveturon. Pli detale pri virina movado ĝis sekvanta fojo.

A. P.

⁂

Moskvo, Novembro 1908.

Situacio politika ; Esperanto en Moskvo.

⁂ Moskva Esperantisto A. Saĥarov intencis eldonadi en Moskvo gazeton esperante kaj ruse. Sed post okmonataj klopodoj antaŭ la rusa Administracio li nune ricevis de la Moskva policestro la respondon, ke la eldono ne estas permesebla, ĉar en la „ Moskva Cenzura Komitato forestas personoj, kiuj konus Esperanton. ” En la rusa leĝaro estas tute ne antaŭvidataj tiaj motivoj por la malpermesoj, sed... Rusujo travivas la militan tempon, kiam „ rajto estas portata sur pinto de glavo ”. Alilanduloj kredeble, diros, ke mi ŝercas. Ne, tute ne! Nune preskaŭ tuta Rusujo estas anoncita de la rusa registaro „ en milita stato ” ĝis „ plena trankviliĝo ” — per aliaj vortoj — ĝis tia stato, kiam en Rusujo malaperos protestado kontraŭ rabado de la regna kaso, nelaŭleĝaj agoj de regnaj oficistoj, k. t. p. Sendube, al ni oni rediros, ke nune en Rusujo ekzistas la popola reprezentantaro — Regna Dumo. Jes, ĝi ekzistas, sed en falsita formo. Tion ĉi diri ni havas la plenan rajton, ĉar la nuna (tria) Regna Dumo estas elektita laŭ la balotleĝo, en kiu la „ venkintoj de nia popolo ” — rusa registaro — faris sufiĉe gravan falsadon. Okazis tiu ĉi cirkonstanco tiamaniere. En 1905 jaro nia registaro, timigita de la komuna striko, donis la balotleĝon, kiu produktis la unuan Regnan Dumont Kadetan, kaj la duan-socialistan. Sed ambaŭ Dumoj ne plaĉis al nia rekuraĝiĝinta registaro ; ĉar la kadeta partio opiniis „ se multhavulo ne deziras perdi ĉion, li devas cedi parton de sia havajo al nehavulo ” — pro tio la unua Dumo post tri monatoj de sia ekzistado estis disigita. Duaflanke, ĉar la socialista partio opiniis „ por feliĉo de la plejparto, iloj de produktantoj, ĉu la tero, ĉu fabrikoj, devas esti komuna proprajo, kie ĉiu deziranta labori ĉiam povas ricevi laboron, ne vendante siajn fortojn ” — la dua Dumo ankaŭ baldaŭ estis disigita. Kaj samtempe de la registaro estis ŝanĝita la balotleĝo. La nova (de 1907 jaro) balotleĝo estis kunmetita tiamaniere, ke ĝi multe pli garantias la rajtojn de ekspluata proprajo. La membroj de la tria Dumo, elektitaj laŭ tiu ĉi leĝo, antaŭ ĉio zorgis pri sia proprajo, komencis ellabori la leĝojn, kiuj unuflanke, garantius ĉiun proprajon, kaj duaflanke, trankviligus ĉiujn rusajn regnanojn. En kia grado la Dumo sukcesos, montros la estonto, sed dume ni vidas rezultaton de la agado de nia registaro. Antaŭ du semajnoj preskaŭ tuta rusa studentaro faris la strikon kontraŭ multaj „ trankvilcelantaj” agoj de la Ministro de popola instruado S-ro Svarc. Sekve, nek mortpunoj, nek ekziloj, nek aliaj premrimedoj povas neniigi proteston kontraŭ mallibereco.

⁂ Nune kelke da sciigoj pri la movado en Moskvo de nia ideo. Lastan tempon multe atentigis pri nia afero la fondata en Moskvo societo de rusaj kuracistoj esperantistaj, en kies fondo partoprenis famekonata prof-ĥirurgiisto Diakonov kaj D-ro Kabanov kaj Sidlovsky.

En septembro en Moskvo estis aranĝitaj en la marista kaj aklimatacia ekspozicioj du specialaj esperantaj ekspozicioj. Dank'al tia ĉi agado de ĉitieaj esperantistoj en Moskvo naskiĝis multaj novaj esperantistoj kaj Esperanto komencis altiri al si grandan intereson. Pri la apartaj faktoj de la Esperanto-movado aperis en ĉitieaj gazetoj multaj mallongaj artikoletoj, kvankam pli aŭ malpli grandaj artikoloj pri Esperanto tute forestas. Ekzemple, pri la Dresdena kongreso preskaŭ nenio estis presita.

Finante nian artikolon, ni petas ĉiujn rusajn esperantistojn sendi al redakcioj de legataj de ili gazetoj, kie nenio estis skribita pri la Dresdena kongreso, poŝtkartojn kun demandoj kial nenio estis presita en la gazetoj pri tiu ĉi kongreso. Tiuj ĉi poŝtkartoj povas alporti grandan utilon al nia kaŭzo, atentigante la redakciojn pri nia afero. Alie ĉiam povas ripeti ĝi la fakto kiu havis la lokon kun ni dum la pasinta jaro en la redakcio de unu granda Moskva gazeto, kiam ni petis presigi en tiu ĉi gazeto la artikolon pri la Kembriĝa kongreso. La redaktoro de tiu ĉi gazeto, vidinte la titolon de la artikolo : « La tria tutmonda Esperantista Kongreso », kaj eĉ ne legante la artikolon, tuj diris : „ Pardonu, Sinjoro, ni ne havas lokon en nia gazeto, por presigi tiun ĉi artikolon, tiom pli, ke la legantaro tre malmulte interesiĝas pri Esperanto ” Kiam redakcioj ricevados multajn supredirıtajn demandojn, ili jam ne opinios tiamaniere.

LIBERAMULO.

SVISUJO

Berno, Novembro 1908.

La balotoj ; Konkurso Gordon Bennett.

⁂ Lastatempe okazis la balotoj de la Nacia Konsilantaro. En Svisujo, la leĝofaranta potenco apartenas al Nacia Konsilantaro, kiu konsistas el ĉirkaŭ 160 deputatoj (1 por 20.000 loĝantoj) balotataj de la popolo por tri jaroj kaj al ŝtatara Konsilantaro, kiu konsistas el 44 membroj (2 por kantono), elektitaj plej ofte de la popolo. Kiel kutime, la lastaj balotoj okazis en plena trankvilegeco ; la plej granda parto de la deputatoj estis rebalotita senbatale. De sesdek jaroj la plimulto apartenas al la radikala partio, el kiu konsistas la tri kvaronoj de la Parlamento. Centre kaj dekstre sidas la liberala partio, kiu ekzistas nur en la protestantaj kantonoj, kaj la katolika partio, kiu estras en kelkaj kantonoj ; maldekstre sidas la socialistoj, kiuj pro la balotsistemo estis reprezentitaj nur de du deputatoj, kvankam iliaj kandidatoj ricevas ĝis 80.000 voĉoj. La politika situacio varias laŭ la kantonoj. Kiam estas batalo kaj la socialistoj sufiĉe timindaj, liberaloj kaj radikaloj unuiĝas (ekz en Zuriĥo) kaj tiel ĉie ricevis la plimulton ; nur en Genevo, la radikaloj unuiĝis kun la socialistoj kaj cetere estis venkitaj de la liberaloj ; en tiu urbo ne estis malpli ol 12 listoj kaj partietoj. Entute, nenio estas ŝanĝita ; nur socialistoj gajnis du aŭ tri lokojn

⁂ Pli interesis la publikan opinion la bela venko de balonisto Schaeck, kiu ĉe la konkurso Gordon-Bennett, restis en aero pli ol 70 horojn kaj elbaloniĝis ĉe Norvega bordo. Tiu neatendita venko haviĝis al Svisujo la honoran pokalon kaj la taskon organizi la venontan konkurson ; jam oni parolis pri Zuriĥo kaj Lausanne.

X..

USONO

Seattle, Novembro 1908.

La Kvina en Usono ; alvoko al Kongresontoj!

La sciigo ke la Kvina okazos en Usono kaŭzis grandan ĝojon inter la ĉi-tieaj Esperantistoj kaj samtempe multe surprizis nin. Kvankam ni bone konas ke Chautauqua, la urbeto elektita por la kongreso, estas unu el la plej taŭgaj lokoj en la mondo por tiaj kunvenoj, ni apenaŭ esperis ricevi tian grandan honoron de la eŭropaj esperantistoj, pro la granda interspaco inter la du kontinentoj, la kosto de la vojaĝo kaj la tempo necesa por viziti Usonon.

Tamen ni tre fieras pro la honorego kaj deziras certigi ke la Esperantistoj kiuj faros la viziton neniel bedaŭros ĝin.

Kompreneble ĉiuj Eŭropanoj jam multon aŭdis pri la diversaj mirindajoj, naturaj kaj artefaritaj, videblaj en Ameriko, kaj amus ilin vidi. Al tiuj esperantistoj kiuj povos iamaniere aranĝi ĉeesti ĉe la Chautauqua kongreso, ni urĝe petas ke ili tion faru Ne nur vi ĝuos la plej interesan kongreson en la historio de esperantismo, en la plej fama kunvenloko de Ameriko, sed okazo sin prezentos la okazo vidi la mondfaman akvofalon “ Niagara ”, kaj la famajn “ Thousand Islands ”, (Mil insuloj) de la grandega rivero St. Lawrence, apud Chautauqua. Troviĝas ankaŭ multaj aliaj belajoj, kiel la Yellowstone Nacia Parko, Grandega Kanjono de la Colorado, la Granda Sallago de Utah ŝtato, kaj multaj aliaj. Bedaŭrinde tiuj lastaj belajoj sin trovas tre malproksime unu de la alia kaj multe da mono estas necesa ilin viziti. Se iuj decidos viziti la pacifikan marbordon, — kaj ni esperas ke multaj tiel decidos — ili vidos la plej interesan parton de Usono. Tie ĉi la klimato estas milda, la tero tre fruktodona, la loĝantoj tre gastamaj kaj ni havas la plej belajn montojn, lagojn, naturajn parkojn, mirindan golfegon (Puget Sound), ankaŭ la plej grandajn arbojn en la tuta mondo (Sequoia Gigantea de California ŝtato). En Seattle tiun someron okazas granda ekspozicio, kiu sola indas la longan vojaĝon de Chautauqua.

Ankoraŭ estas tro frue multon diri pri la preparoj farotaj por la kongreso mem, sed la nove fondita Esperanta Asocio de Nordameriko jam komencis klopodi pri la aranĝoj, kaj ĉar ĝiaj estroj estas kapablaj kaj energiaj, neniu povas dubi pri la sukceso de la afero Cetere ni havas la povegan helpon de la granda Chautauqua Institucio, la plej grava organizajo por la meminstruado en la tuta mondo ; ĉar tiu societego havas filiojn ĉieajn en Usono, kaj ĉar ĝiaj regulaj kursoj nun enhavas Esperanton, multegaj sendube komencas akiri la lingvon kiuj ali kredeble neniam interesiĝus.

La kongresejo ĉe Chautauqua perfekte taŭgas por la celo kaj facile akomodos la plej grandan aron da vizitantoj, sed ĉar en aliaj jurnaloj baldaŭ troviĝos plenaj sciigoj pri la bela urbeto, ne necesas tie ĉi priskribi ĝin.

Ni estas feliĉaj konstati ke la novajo pri la venonta kongreso jam vekis multe da intereso ĉie en la lando kaj Esperanto faros grandan antaŭenpaŝon en Usono dum la proksimaj monatoj.

Charles E. RANDALL.

Kroniko Politika

Tumulta duonmonato dank'al la diversaj klopodoj de sinjoroj diplomatoj kaj financistoj! Apenaŭ estis ekpasinta la unua timo pri sangaj konfliktoj en Oriento, pri kies estonta stato regas nun la plej granda konfuzo, jen alia afero, ne pli ĝojiga, ŝanĝis momente la direkton de la publika atento : aperis en angla gazeto interviuvo de imperiestro Vilhelmo IIa pri la rilatoj inter Britujo kaj Germanujo, kaj aludanta faktojn malnovajn, sed, almenaŭ se la interviuvo havas la celon, kiu ŝajne gvidis lian aŭtoron, nelerte kaj negustatempe prezentitajn. El tio granda emocio en la ĉiulanda diplomataro kaj politikistaro, kaj gravaj kritikoj de la nomita artikolo en la plej multaj gazetoj, eĉ la germanaj, kiuj akre ekplendas pri la persona kaj nekontinua kondukado de la ekstera politiko; princo von Bülov proponas sian ekziĝon ; kiu tuj estas rifuzita, kaj... subite, nova afero tirita el la malnovajoj de Maroko, kiu de kvar jaroj estas la neelĉerpebla pretekstujo de ĉiuj malkonsentoj arte kreitaj de kelkaj interesatoj. Oni rememoras — eble — ke antaŭ ne longe naskiĝis en Casablanca konflikteto inter francoj kaj germanoj okaze de la aresto de kelkaj transkurantoj. Tiun konflikton oni decidis solvi per arbitracio sed la afero iris verŝajne tro bone : falis en ies kapon, ke la nacia honoro ne estas kontentigita kaj en ĝia nomo oni povas malaperigi diversajn neagrablajojn de interna politiko : mankis esprimoj de senkulpigoj pro la konflikto. Post tio, unueca protestado de la franca gazetaro kaj nova serioza emocio en politikaj rondoj. Oni certe trovos formulon, kiu solvos la malkonsenton, ekzemple reciprokaj kaj samtempaj esprimoj de bedaŭroj pri la konflikto en Casablanca (kiun neniu bedaŭris kaj priparolis antaŭ kelkaj tagoj). El mil demandataj francoj aŭ germanoj, ĉiuj, krom unu malsana ŝovinisto, certege respondus, ke tiu afero estas al ili absolute indiferenta kaj la Marokaj transkurantoj ilin nek koncernas, nek iel ajn interesas, tamen dank'al la nuna stato de Eŭropo rezultanta el la kunligoj aŭ interkonsentoj kaj naciaj intrigoj, de tiaj bagateloj povas dependi la vivoj de miloj da homoj... Ĝis kiam ĉi tio daŭros ?

A. R.

La Faktoj

Oktobro 21. — Parizo. — Picard estas elektita ministro de la maristaro.

23. Bruselo. — Terura brulado en la telegrafa oficejo.

Friedrichshafen. — Unua feliĉa supreniro de la nova aerŝipo « Zeppelin ».

24. Faenco. — Solena rememorigo de la fizikisto Evangelisto Toricelli lernanto de Galileo

Nova-Jorko. — Okazas la aŭtomobila Kurado por la pokalo Vanderbilt. Longeco de la Kurejo 258 mejloj

26. Torino. — Mortas Jozefo Biancheri malnova deputato kaj plurfoje prezidanto de la Deputataro.

Romo. — Tittoni ricevas viziton de Tomanoviĉ prezidando de la Montenegra ministraro

Inaŭguro de la XVIIIa Kongreso de interna kuracarto.

Londono. — Mortas kardinalo Matthieu, membro de l' Francuja Akademio.

27. Barcelono. — Mortas kardinalo Casanas y Pages.

28. Sofio. — Reĝo Ferdinando inaŭguras per parolado la XIVa kunsidon de la Deputataro.

Marmanda. — Oni mortigas per bombo sendita per poŝta pakajo la guberniestron de Schudstanisam kaj lian filon.

Saragozo. — La hispanaj gereĝoj inaŭguras monumenton al la dependantoj de la urbo

Romo. — Inaŭguro de busto al patrioto Mario Pagano.

Londono — L'Aero-Klubo de Granda Britujo donas la oran medalon per 1908 al fratoj Wrigt

30 Londono. — Oni subskribas la interkonsenton de Anglujo kaj Germanujo pri la batalado kontraŭ la dormadomalsano en orienta Afriko.

31. Romo. — La unua milita aerŝipo feliĉe plenumas la trairon el Braĉiano al Romo kaj male (80 klm).

Konstantinoplo. — Sanga konflito pro la ribelado de bataliano ; 3 mortintoj.

Berlino. — La juĝantaro de la aerveturanta konkurso per la pokalo Gordon Bennett asignas unuan premion al la svisa balono *Helvetia*, la duan al la angla *Banshe*.

Châlons-s.-M — Henriko Farman gajnas la premion de la Franca Aero-Klubo.

Novembro 2. — Hong-Kong. — La ĥina popolaĉo rabadas en multaj japanaj butikoj ; multaj arestitoj

Parizo. — La ministro de l'ekterlandaj aferoj ricevas la viziton de la serba ministro de l'eksterlandaj aferoj Milovanovic.

3. Nova-Jorko — Wilhelmo Taft estas elektita prezidanto de Usono kontraŭ Bryan.

4 Theheramo. — Oni anoncas ke la *Kurdoj* ribelis kontraŭ la Sao de Persujo.

Parizo — Antaŭ la ministroj Pichon kaj Caillaux, oni subskribis la aldonan akton de la mona latina interkonsento.

Vieno. — Alveturo de la reĝo de Grekujo kiu estas afable ricevita de l'imperiestro Francisko Josef

5 Parizo. — Momenta malkonsento de Francujo kaj Germanujo pro okazintajo en Casablanca.

Ministro Barthou promesas difini 40,000 ₷ al progresoj de l'aerveturado.

Berlino. — La registaro akiris la direkteblan aerŝipon « Parseval ».

A. TELLINI.

ESPERANTO

MOVADO ESPERANTISTA

Notindajoj.

Aŭstrio : Fondiĝis Ligo de german-aŭstriaj Esp-istoj ; prez. S-roj Simon, Schröder, Hartwich; sidejo : Wien (Bandgasse, 31) — *Britujo :* En Londono aperas *Londona Gazeto*, organo de la tiea federacio, kiu kalkulas grupojn en ĉiuj kvartaloj de Londono Novaj grupoj en Mildmaj, Sutton, Coventry, Buckingham, London-S E., Bury, Bath, Montrose. *Francujo :* Oni preparas novan gazeton : *Franca Esperantisto*. La kursoj en Parizo havas grandan sukceson ; la tiea grupo kalkulas 1 000 anojn. La prezidanto de la S.f.p E. estas de nun S-ro Th. Cart — *Germanujo :* La 3a Germana Esp Kongreso okazos en Gotha. Novaj grupoj en Bamberg, Bonn, Glauchau, Insterburg, Meissen, Posen ; granda progreso speciale en Saksujo. — *Nord Ameriko :* Kutimaj progresoj en Usono. Grupo en Puebla (Meksik.). — *Sud-Ameriko :* Nova grupo en Buenos-Ayres Brazila Esp Kongreso decembre okazos en S Paulo. En Cilo, la Virina Esp Societo fondis grupojn en Limache, Chillan, Ancud, Linares, Traiguen, k. t. p.

Bibliografio.

En Svislando (kvin rakontoj el Svisaj aŭtoroj, trad. E. Ramo. G Warnier, Paris. 1 ₷) — *Aspazio* (kvinakta tragedio de A. Svjentochovski, trad. D-ro Léon Zamenhof. Paris-Hachette. 1 ₷). — *Recueil de Phrases* (franca eldono de Frazaro. H de Coppet. Paris-Hachette 0,72 ₷). — *Persaj Skizoj* (G. Davidov. Esp Bibliotheko - Budapesto. 0,12 ₷).— *Ajcatur* (trad G Davidov - Budapesto. 0,12 ₷). — *Kredo kaj Scio.* (Parolado de D-ro P. Gruner, trad. E. Ramo. Kündig - Genevo). — *Dankon* (J. Combe, trad. E. Ramo. Eggiman - Genève). — *La Reĝino de l'Arbaro* (S Lagerlof, trad. T. V Bäckström. L. Son Tinn, Sala, (Sved). ₷ 0,10). — *Sveda Jarlibro Esp.* (de P. Ahlberg. Stockholm. ₷ 0.22). — *Deveno & Historio de Esperanto* (0,25 ₷. Casopis Ceskych Esp Praha-II). — *La Dogmaro pri la Vico* (el Emanuel Svedenborg).

PERESPERANTAJ SOCIETOJ

Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj.

La I. S. E. J. havas celon krei kaj konservi inter siaj anoj aferajn rilatojn, konigi al la fremdaj juristoj la samideanajn kunfratojn aŭ jurlaborantojn en ĉia landon, ebligi la sendon de aktaro en la plej malproksimajn landojn kun certeco trovi tie korespondanton, unuvorte unuigi la Esp juristojn de ĉiuj landoj. La jara kotizajo kostas 15 m ESPERANTO estas la oficiala organo de la I. S. E. J. Por ĉiuj informoj, sin turni al S-ro Sergeant, 31, Bd Mariette, Boulogne-sur-Mer (Francujo).

OFICIALA INFORMILO

IIIa ĝenerala konveno (sekvo).

Estas nomita komisio de la vortaro, kiu enhavos kiel konstantajn anojn la naciajn vicprezidantojn de ĉiu lando. Al tiuj anoj estas aldonita la nomo de S-ro Laignier, el Reims. Franc.

La kunveno decidas kuniĝi la postmorgaŭan tagon en neoficiala kunveno kie oni provos la laboron teknikan de la vortaro.

Propono de S-ro Sergeant, pri deklaracio al D-ro Zamenhof.

Unuanime, la kunveno voĉdonas la sekvantan deklaracion :

« La ĝenerala kunveno de l'I. S. E. J., riprezentanta la societan anaron, sendas unuanime al D-ro Zamenhof, sian plej respektan saluton, kaj la certigon de sia tuta kaj absoluta fideleco al la Fundamentaj principoj de l'Esperanto ».

La kunveno decidas ke tiu adreso estos tuj sendata al la sekretario de la IVa Kongreso. (La adreso estis legita de S-ro Moch, dum la lasta laborkunveno de la Kongreso).

La kunveno decidas ke oni sendos al la Komercaj ĉambroj sciigojn pri la Societo, kaj diskutas kiamaniere oni propagandos apud ili.

La kunveno decidas ke, laŭ la cirkulero de la Lingva Komitato, la Societo proponos al la Lingva Komitato la nomon de S-ro Degon, kiel delegito de l'I. S. E. J. en la lingva komitato (Jurista vortaro).

Fine, la kunveno decidas ke la 4a ĝenerala kunveno okazos en la urbo Eŭropa de la 1909a kongreso, sed ke okazos kunveno jurista en Usono ; ĝi komisias por ĝin organizi S-ron Ampt, vicprezidanto por Usono, kiu ĉeestas la kunvenon.

Esperantista Akademio. — Ĉiuj niaj anoj plezure scios ke nia bona amiko Ellis, vicprez. de l'I. S. E. J (Anglujo) estas jus elektita akademiano de la Lingva Komitato. Estas por nia societo tre granda honoro kaj ni sendas al nia societano niajn plej korajn kaj sincerajn gratulojn.

Novaj Societanoj :

Germanujo. — Auerbach Siegfried, jurist-stud., Windeckstrasse, 60, *Frankfurt-a.-Main.*— D-ro Clemens, profesoro, *Dresden N. 6.* — Kliemke Ernst, D-ro de juroscienco, Motzstrasse, 50, *Wilmersdorf (Berlin).*

Skotujo. — Heron Alexander, solicitoro S.S.G., Mercluston Park, 14, *Edinburgh.*

Rusujo. — Rajchmann Josefo (viz. prez.), advokato, Stomackie, 2, *Varsovio.* — Dobrzanski Stefan, helpjuĝisto, *Kielce.*

Aŭstrujo. — Barvir Josef, kandidato de advokato, Ruzova str. 1, *Praha* (Bohemujo). — Adler Arturo, emp reĝa financkonsilisto, str. Teatralua 21, *Lwow* (Leimbeig), Galicio. — Herold Benedikto, stud. jurist., *Lwow* (Leimbeig), Galicio. — Wierzchowski, revalico de korezak hieronimo. emp. r. juĝa konsilisto, str. Glowinski, n. 14, *Lwow* (Leopolo), Galicio.

Francujo. — Widiez, subinspektoro de registrado, *Valenciennes.*

Internacia Societo de l'Esperantistoj donas al ĝiaj membroj ĉiumaniere praktikajn kaj idealajn profitojn.

Komerco — Industrio — Interŝanĝo — Arto
Scienco — Intreprenoj
Konsulejoj en ĉiuj mondpartoj

Preciza informo senpage per la konsulo ĝenerala : Paul Nollenberg, Berlin N. W. 52 (German.), Lüneburgerstr. 30

AL NIAJ LEGANTOJ

Ni informas niajn francajn legantojn, ke dank'al speciala interkonsento ni de nun liveros al ĉiuj niaj francaj abonantoj *senpaĝan* eldonon de « ESPERANTO » kiu krom la kvar paĝoj de la Esp. eldono havos france redaktitan aldonon, en kiu kunlaboros regule plej konataj francaj Esperantistoj. Tiu eldono estas liverebla nur al la *abonantoj de Francujo*. Jara abono: 4 fr. (1,60 m.). La ĝisnunaj abonantoj, kiuj dezirus ricevi tian aldonon bonvolu sendi tuj *1* fr. plie.— Por ĉio, kio koncernas tiun eldonon, sin turni (poŝtmandatoj, k. t. p.).

Librairie de l'Esperanto,
15, rue Montmartre, Paris.

★

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Alta Konsilantaro.

Laŭ § 21 kaj 22 de la Regularo, la *Alta Konsilantaro* de U. E. A. estis formita kiel sekvas:

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, honora prezidanto.

S-ro Rektoro E. Boirac, prezidanto de la Esperantista Akademio kaj de la Esp. Lingva Komitato; prezidinto de la Universala Kongreso de de Esperanto.

S-ro D-ro Mybs, prezidanto de la *Germana Esperantista Societo*; prezidinto de la IVa Universala Kongreso.

S-ro Kolonelo Pollen, prezidanto de la *Brita Esperanto-Asocio*; prezidinto de la IIIa Universala Kongreso.

S-ro Generalo Sebert, prezidanto de la konstanta komitato de la kongresoj.

Ni tre dankas la supre nomitajn personojn, kiuj per sia partopreno en nia *Alta konsilantaro* bonvolis publike doni al U. E. A. la apogon de sia aŭtorita ateco kaj sperto.

* * *

Fako 1a. — Administrado.

Avizoj al la Delegitoj kaj subdelegitoj. — Pro prokrasto en la presado kaj malfacilajoj en la sendado, la cirkuleroj anoncitaj en la lasta Nº estis senditaj nur en la mezo de novembro. Ni rememorigas, ke la tempolimo por la balotado de la komitato estas la 30a de novembro. Ni petas, ke ĉiuj bonvolu nepre ĝustatempe resendi sian voĉdonilon

Gazetaro. — En la lasta tempo la jenaj gazetoj favore raportis pri U. E. A.: *Züricher Post, Zuricher Zeitung, Gazette d'Armentières, Journal d'Amiens, Lyon-Républicain, Pas-de-Calais*, k. t. p.

La tre grava franca gazeto *Lyon-Republicain* sub la titolo « Universala Framasonaro » publikigis bonegan ĉefartikolon pri U. E. A. subskribitan. S-ro G. Cazal.

⁂ El *British Esperantist* (Nº 47) ni eltiras la jenajn interesajn liniojn:

« Komitata kunveno B. E. A.: S-ro W. W. Mann, kiel oficiala reprezentanto de British Esperanto-Association ĉe la kunvenoj de U. E. A. en Dresdeno, legis raporton pri la celoj kaj agado de ĉi tiu. La komitato esprimis sian koran aprobon pri la celoj de U. E. A. kaj rekomendas, ke ĉiuj Britaj Esperantistoj alportu al ĝi aktivan kunlaboradon ».

Novaj grupaliĝoj. — De la lasta nº, la jenaj grupoj elektis delegitojn.

Berlin (German). — S-ro Karl Steier (Hubertus 8, Oranienbrug).

Halifax (Britujo). — S-ro E. S. Christie (Iona House).

Manchester (Brit.). — S-ro A. Marriatt (9 Albert Eq).

Pilsen (Bohem). — S-ro B. Tytl (Radinskánl, 10)

Roma (Ital.). — S-ro P. Dottarelli (29, Via Belsiana)

Pro forveturo, la du Delegitoj de *San Sebastian* estas anstataŭitaj de S-roj Angel, Dijon (St Gral Gauregui 16 1) kaj A. Tuduri (Str. Bengsechea 2).

Pro forveturo la Delegito de *Bukarest*, S-ro Haimoviĉi, estas anstataŭita de S-ro H Haimsohn (La Gheosdan, Str. Coltei 19).

Por urbo *Bedford*, oni estas petata sin turni al S-ro Duden y, Vicdelegito (34, High Str.), pro forvojaĝo de la Del.

La adreso de la Del. de *Königsberg*, S-ro K. Nitz, estas nun Löbenichtsche Langgasse 29-II

Entute 353 lokoj kun 216 delegitoj kaj 171 subdelegitoj.

Subdelegitoj:

7a Listo de subdelegitoj:

Aschersleben (German). — S-ro K. Wallon (6 Mehringerstr).

Centellas (Barcel-Hispan). — S-ro J. Rauvell.

Champforgueil (Franc). — S-ro E. Perrusson.

Freiberg (German). — S-ro M. Sengelboden (Chemnitzestr).

Fribourg (Svis). — S-ro Albert Hug (Prof. kolegio).

Gera (German). — S-ro E. Ulitzsch (Schillerstr. 20-III)

Grossenhain (German). — S-ro B. Böttcher (Hermann tr. 14)

Hilversum (Holando). — S-ro von Römer (Lo sdrw g 60).

Kettering (Britujo). — S-ro A. E. Smith (14 Parfi ldstr.).

Leoben (Aŭstrio). — S-ro P. Waznauer (ĉe S-ro Griessier).

London SE. (Britujo). — S-ro C. L. Fairman (Romda Rd 79).

Rotingen a/ h. (German). — S-ro Scheiders.

Rodez (Aveyron-Franc). — S-ro P. Delfour (Kolegio).

Smyrne (Azio). — S-ro E. Missailidis (Orienta Banko)

Siedlce (Polujo). — S-ro Alfonso Wierzbizta.

La Subdelegito de *Como* (S-ro C. Monti) loĝas nun ĉe S-ro L. Sant'Eliq, via Odescalchi 14

Ŝanĝo de loĝejo. — Kiam Esperantiano translogiĝas de iu urbo en alian, li bonvolu konsideri kiel sian devon, viziti antaŭ sia forveturo la Delegiton de la urbo kiun li forlasas, kaj ankaŭ post sia alveturo, la Delegiton aŭ Subdelegiton de la urbo en kiun li alvenis. Tiu lasta donos al li, kompreneble sen plua pago novan membrokarton por anstataŭi tiun, kiun subskribis la Delegito de la regiono el kiu venas la dirita Esperantiano

Kiam Esp-ano loĝiĝas en urbon kie estas nek Del. nek Subdel., li estas tre petata, akcepti en tiu urbo la taskon de Subdel., aŭ se li ne povas plenumi tiun oficon, instigi iun Esper-iston de la dirita urbo, ke li prenu sur sin la Subdel econ. Fine, se li povas nek akcepti tiun taskon nek trovi iun por ĝin plenumi, li restu Esper-ano dependanta de la Del. de sia antaŭa regiono, aŭ li bonvolu enskribiĝi sin en la regiono de la plej proksima Delegito.

Jarlibro. — Ni de nun preparas duan eldonon de la oficiala jarlibro de U. E. A. Tiu eldono enhavos: 1e) la regularon jus voĉdone akceptitan de la Delegitoj; 2e) la liston de la bonfarintaj membroj; 3e) ĉiuj informojn pri la Komitato, la diversaj fakoj de U E. A., la diversaj servoj organizitaj de ĝi; 4e) la liston de la Deleg., Vicdeleg. Subdel. kaj Esp.-Oficejoj; 5e) la liston de la firmoj kiuj aliĝis al U. E. A.; 6e) anoncojn kaj reklamojn.

Ni bezonos 50 paĝojn por ĉiuj informoj rilate al U. E. A. anstataŭ 24 en la 1a eldono. Por ke ni povu vendi la jarlibron ne pli koste ol nune, estas necesege ke niaj Deleg., Subdeleg. kaj speciale niaj Konsuloj por komerco, klopodu por havigi al ni reklamojn kaj anoncojn. Jen la tarifo:

1 paĝo	(nuna formato)	₷ 5.—
1/2 paĝo	—	₷ 2,50
1/4 paĝo	—	₷ 1.25
1/5 paĝo	—	₷ 1.—
1/10 paĝo	—	₷ 0,50

Plie, ni enpresos ankaŭ du liniajn anoncetojn po ₷ 0,25 (korespondado, interŝanĝo de poŝtkartoj, poŝtmarkoj, k. a.).

Oni kiel eble plej baldaŭ sendu al ni la tekstojn de presotajoj.

⁂ *Esperantianoj.*

Ni havas la plezuron sciigi, ke la nombro de la Esperantianoj, kies aliĝo estis regule transdonita al la Fako 1a, jus atingis 2000. Ni treege insistas por ke niaj Del. kaj Subdel. sendu al ni la listojn de ĉiuj membroj kiuj aliĝis por *1908*, se ili tion ne jam faris, kaj kune, la parton de la kotizajo difinita por la centra kaso.

Ni tutkore speciale dankas, je la nomo de nia tuta kara Esperantio, jenajn Delegitojn, kiuj malgraŭ la malfacilajoj kaj malhelpoj de la komenco, varbis grandan nombron da membroj:

S-ro Robert, Paris: 112 membroj.
S-ino A. Tuschinski, Danzig: 100 membroj.
S-ro Szabuniewicz, Moskvo: 66 membroj.
S-ro H. Hodler, Genève; 44 membroj.
S-ro Rockmann, Magdeburg: 40 membroj.
S-ro Alcorta, San Sebastian: 40 membroj.
S-ro Robin, Varsovio: 37 membroj.

⁂

Fako 2a. — Financoj.

Financoj. — Spezoj dum monato oktobro:

Subfako *Administrado* (Genève).

En kaso la 1a de oktobro	₷ 38.30
Enspezoj	₷ 236.93
Sumo	₷ 275,23
Elspezoj (korespondado, sendo de cirkuleroj)	₷ 56.83
En kaso la 1a de novembro	₷ 218.40
Sumo	₷ 275,23

Subfako: *Financoj* (Beaune).

Enspezoj	₷ 48,64
Deficito	₷ 21,42
Sumo	₷ 70,06
Deficito de fako 2a la 1a de oktobro	₷ 3,84
Elspezoj (korespondado, presajoj)	₷ 66,22
Sumo	₷ 70,06

Etato de la Financoj la 1a de novembro:

En kaso en Genève	₷ 218,41
Ŝuldata de la Delegitoj (proksim.)	₷ 80 —
Sumo	₷ 298,41
Deficito	₷ 40.51
Sumo	₷ 338.92
Deficito de la kaso de Beaune	₷ 25,46
Fakturoj por presajoj	₷ 211 64
Ŝuldata por insignoj	₷ 101,92
	₷ 338.92

Nia antaŭa deficito estas do preskaŭ forigita, precipe dank'al al malavaraj donacoj de kelkaj fervoraj amikoj de nia entrepreno.

Dum monato novembro kaj decembro ni antaŭvidas iom gravajn elspezojn por sendo de cirkuleroj, presigo de novaj membrokartoj, k. a. Niaj Deleg. kaj Subd. bonvolu do tuj klopodi por repagigo de la kotizajoj por 1909a kaj varbo de novaj membroj, kaj kiel eble plej ofta plenigo de la mendiloj kiuj akompanas la aliĝilojn, tiamaniere ke en la komenco de 1909a niaj financoj estu en tute bona stato.

La monon oni ĉiam bonvolu sendi al la jus kreata Fako: *Financoj*, laŭ jena adreso:

Esperantio, Place de la Halle, Beaune (Côte-d'Or), Francujo.

La provizora fakestro,
Th. Rousseau, helpkomitatano.

⁂

Fako 3a. — Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj

Konsulinoj por Virinoj. — S-ino Jane Paris (Les Hommeaux, le Lion d'Angers Maine-et-Loire-Francujo) estis komisiita por iu subfako. Ĉiuj Delegitoj estas insiste petataj elekti konsulinon por Virinoj en sia regiono kaj komuniki iliajn nomojn al la supra adreso; ĝis nun ekzistas konsulinoj por Virinoj en la jenaj lokoj: *Amiens, Amsterdam, Bad-Godesberg, Basel, Beaune, Beziers, Bilbao, Boulogne-sur-Mer, Bourg, Bradford, Bukarest, Carcagente, Castellon, Châlon-s.-S., Davos, Douai, Dresden, Düsseldorf, Enguera, Eskiltuna, Evansville, Firenze, Frankfurt-s.-M., Genève, Glascow, Goole, Hannover, Helsingborg, Huy, La Flèche, La Rochelle, Lausanne, Le Creusot, Levallois, Liverpool, London, Lyon, Magdeburg, Marseille, Moskvo, Namur, Napol, Neuchâtel, Niort, Paris, Praha, Reims, Rennes, Rhos, Rotterdam, Sabadell, Saint-Etienne, Samos, Smyrne, Suursaari, Tarancon, Toulon, Troyes, Tunis, Varsovie.* En tute 61.

Gvidfolioj & gvidlibroj. — S-ro Cazeaux, (77, rue Lachassaigne, Bordeaux) estis komisiita kiel helpanto por fako IIIa, speciale pri tio, kio koncernas gvidfoliojn kaj gvidlibrojn. El lia unua enketo rezultas, ke gvidfolioj estis eldonitaj en *Amiens, Bad Godesberg, Beaune, Châlon-s-S., Genève, Le Creusot, Huddersfield, Marseille, Niort, Paris*, kaj gvidlibroj en *Bourg, Edinburgo, London, Le Puy, Magdeburg, Praha, San Sebastian*; aliaj — folioj aŭ gvidfolioj — estas en preparado en *Amiens, Bradford, Boulogne-s-M., Lyon, Troyes, Tours, Praha, Wiesbaden.*

Ni tre petas niajn Delegitojn, ke ili bonvolu klopodi por la eldono de gvidfolio. Laŭ la klarigoj liveritaj en la broŝuro « Konsuloj & Esperanto-Oficejoj », tia gvidfolio kostas tre malkare, aŭ eĉ povas liveri profiton, se oni kolektas kelkajn reklamojn ĉe la lokaj komercistoj, kiel tio jam estis farita. Tiu folio devas enhavi informojn pri la lokaj Esp. institucioj (nomoj de la Delegito kaj diversfakaj konsuloj, horoj je kiuj ili estas viziteblaj, informoj pri grupkunvenoj, gastotabloj) kaj resumon pri la ĉefaj vidindajoj; tion povas enteni du- aŭ kvarpaĝa folieto, kiu estos utilega al la trapasantoj. En la urboj malmulte vizitataj de la fremduloj, oni povas maŝinskribigi tian folion aŭ ĝin hektografi, anstataŭ tipografie presigi. Oni ĉiam sendu 2 ekz. al la supre nomita adreso. Ni volonte sendos specimenon de tia gvidfolio al la Del. aŭ Subdel. kiuj dezirus eldonigi tian; ni ankaŭ volonte korektos la presprovajojn, se necese.

Ni do tre esperas, ke la supraj ekzemploj estos imitataj de ĉiuj kaj baldaŭ ĉiu U. E. A. loko havos pretan gvidfolion disdonatan al la trapasantoj.

Delegito - Konsuloj U. E. A.

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Anglujo

BURNLEY.

⁂ Esp-Oficejo jus malfermiĝis en Burnley. Adreso: Parker Lane, kontraŭ la Hipodromo. Eniro senpaga! Koran bonvenon al ĉiuj trapasantoj! Instruejo, legĉambro, biblioteko, kaj parolejo. Diversaj libroj riceveblaj. Malfermata ĉiumatene krom dimanĉe, de la 9a ĝis la 10a nokte.

Nia oficejo estas bonega perilo por la diskonigado de katalogoj kaj prezaroj esperante presitaj. Firmoj ĉiuspecaj! utiligu l'okazon.

LONDONO.

⁂ La U. E. A. diversaj funkcioj estas starigitaj kiel sekvas:

U. E. A. Delegito: H. Bolingbroke Mudie. Por ĝeneralaj informoj: W. W. Mann (133, High Holborn W. C.; por Komerco & Industrio: Marshall (133, High Holborn. W C.); Junuloj: S-ro G. J. Cox (125, Broomwood Rd, Clapham Comma S W); Virinoj: S-ino Nicholl, Verda Stelo, Gordon Rd, Wanstead-E. *Esper Oficejo*: 133, High Holborn. W. C. (ĉe Brita Esp. Asocio); konstante vizitebla.

Aŭstrio.

GRATZ.

⁂ La 21a oktobro okazis ĝenerala kunveno eksterordinara de la Stiria Esperantista Societo; oni decidis aliĝi al la ligo de la german-aŭstraj Esp. grupoj. La estraro estas jena:

S-rojn Pettera phil., prez.; Zingl, sek.; Teltschik, kas.

Oni decidis sendi fidespriman rezolucion al la Lingva Komitato.

PRAHA.

⁂ Ekzistas nun kluboj de „ Bohema Unio Esp. " en sekvantaj lokoj: Praha (2), Plzen (2), ĉ. Budějovice, Hradec Králové, Kuklemy, Praskačka, Chrudim, Osch u Rokycan, Brno, Prosek, Mladá Boleslav, Soběslav, Trutnov, Minice, Liberu, Pardubice Pisek, Taromêr, Kralupy. Oni vidas, ke dank'al la modela organizajo de B U E la nombro de ĝiaj membroj ĉiutage pligrandiĝas, ĉar multaj aliaj kluboj anoncis jam sian baldaŭan aliĝon. B U E. aranĝas preskaŭ ĉiudimanĉe *propagandajn paroladojn* en diversaj urboj de Bohemujo. La i. r. ministro de internaj aferoj aprobis, antaŭ kelkaj tagoj la kompletigitan regularon de B U E kaj tuj estis starigitaj novaj sekcioj; fervoraj kunlaborantoj helpas nun la komitaton, kiu senlace laboras. B U E aranĝis *superajn kursojn* de Esperanto, en kiuj oni instruas esperante gramatikon, historion kaj literaturon de Esperanto. Tiuj ĉi kursoj donos grandan profiton al kandidatoj, kiuj intencas fari superan ekzamenon antaŭ la ekzamena komisio de B U. E por ricevi ateston pri kapableco. — *Ekzamena regularo* estis jus presigita kaj estas volonte al interesuloj sendata. — La 4an de tiu ĉi monato vizitis nia kara samideanino S-ino Rosa Junck nian urbon kaj honoriĝis per sia vizito la „ Esp.-Klubon en Praha ", dum kluba kunveno; ĉiuj membroj estis ravitaj pro la entuziasmo de la ŝatinda gasto por nia kara afero. — U. E A. ĉiam pli kaj pli vekas la intereson de la publiko precipe post kiam unu de niaj plej legataj jurnaloj „ Narodrù Politiha " volonte presigis favoran artikolon pri tiu ĉi institucio. La delegito ricevas ĉiutage novajn demandojn kaj ĝojige estas, ke unuavice la komercistoj komencas interesiĝi kaj uzi la praktikajn servojn de U. E. A.

Ĉio koncernanta boheman Esp-aron estu sendata laŭ adreso „ Bohema Unio Esp. ", Praha I-342, Kafejo „ Union ", Ferdinandova.

Jan Hradil, D. U E A.

WIEN.

⁂ En Wien nun ekzistas kvar Esp. societoj, nome: 1e „ Esperanto-Unuiĝo Wien ", la plej malnova; 2 „ Akademia Societo "; 3e la Esper. societo „ Fideleco ", kaj 4e ĉeĥa societo.

La „ Esperanto-Unuiĝo Wien " de tri semajnoj translogiĝis en novan ejon: Kafejo „ Esperanto ", 1 Stubenring 18. Tiu ĉi kunvenejo estas grava akiro, ne nur por la Unuiĝo mem, sed ankaŭ por la Esperanto-movado en Wien, ĉar, sidante sur la plej konata strato de Wien nome Ringstrasse, kaj montranta per grandaj literoj la vorton „ Esperanto ", ĝi altiras la atenton de ĉiuj preterirantoj, tiel ke multaj personoj eniras nur pro scivolemeco. Interne ili trovas grandajn afiŝojn pri Esp.; la kelneroj, kiuj jam lernas Esperanton, vendas propagandilojn kaj atentigas la personojn ke ili trarigardu la preskaŭ tridek diversajn esperantistajn gazetojn, kiuj estas abonitaj de l'kafejestro. La societo kunvenas ĉiuvendrede kaj ofte vidas ĝis dudek gegastoj. La nove fondita ligo de german-aŭstriaj societoj havas sia Oficejon en la sama kafejo. La Oficejo de la „ Esperanto-Unuiĝo Wien " estas kiel antaŭe ĉe la firmo: John Muderword, I. Singerstrasse, 2.

Bosnio

SARAJEVO.

⁂ Novembre la fondanta rondeto de Bosniaj Esp-istoj en Sarajevo (Kafejo Bosnia) havos paroladon de S-ro Fr. Cech, Subdel U. E. A.; ĉar ĝi estas la unua Esp. grupo en Sarajevo kaj Bosnio, ni kuraĝas peti de ĉiuj samid. ke ili bonvolu nin helpi per sia konsilado al la efektivigo de nia celo.

Bulgarujo.

PIRDOP.

⁂ Sukcesa parolado de S-ro Krestanof, U. E. A. Subdel., kiun sekvos senpagaj vesperaj kursoj. Oni intencas organizi ekspozicion kaj pro tio la Subdel. petas pri alsendo de ĉiuspecaj specimenoj, dokumentoj, k. t. p.

(J. H. Krestanof, Pirdop).

Germanujo.

FRANKFURT-a/-M.

⁂ Oni devas ĉiam kaj ĉie labori por nia kara „ Zamenhofa lingvo ", tia estas la devizo de la nova grupo „ Esperantio ", Frankfurt-Main, Niedenau, 12, propaganda parto de la Esper. grupo, Frankfurt (Main). Eble interesos legantaron koni bonan rimedon, uzatan de la dirita grupo por propagandi. La estraro de la Frankfurta „ Esperantio " sendas al la redakcioj de gazetoj en urbetoj, kie ne estas ankoraŭ Esp-istoj aŭ Esp. grupoj, artikolojn pri Esperanto kaj faras samtempe problemon por la legantoj de tiuj ĉi gazetoj. La legantoj devas traduki malgrandan tekston esp. kiun oni enpresigas en la gazetoj germane, kaj la kvin plej bonaj tradukantoj ricevas premion Kune kun la dirita artikolo oni sciigas, ke la grupo „ Esperantio " sendas kontraŭ sendo de la poŝtkostoj esp. broŝurojn kaj esp. ŝlosilojn, kiujn oni bezonas por fari la postulatan tradukon; ĝis nun oni faris tiun ĉi eksperimenton en du gazetoj, en la „ *Ilse-Zeitung* ", *Osterwieck (Harz)*, kaj en la „ *Coburger Tageblatt* ", *Coburg*, kaj havis bonan sukceson. Multe da personoj petis broŝurojn kaj ŝlosilojn kaj multe da personoj sendis solvon de la problemo. Tiamaniere vekas la grupo „ Esperantio " intereson por nia lingvo kaj varbas anojn por nia afero.

Ni rekomendas al ĉiuj niaj anoj kaj propagandistoj fari la saman kaj sciigas al ili ke nia grupo estas ĉiam preta doni informojn pri tiu propagandmaniero.

H. F.

Moresnet.

⁂ La Esp. grupo de Moresnet informas ĉiujn samideanojn, ke ĝi organizos 26 decembre *Esp. feston*, al kiu multaj jam aliĝis. En programo: „ La Renkonto ", unuakta komedio, per la Moresneta grupo; „ La Supujo ", unuakta komedio, per la Verviers'a Societo; „ Sceno de baleto ", de Beriot, per Peka, Aliena grupo. Ni petas ĉiujn samidean kiuj deziras prezenti ion, konigi tion al la Esp. Kons. de Amikejo, S-ro C. Schriewer, Neŭtra Moresnet, antaŭ 1 dec, por enpresigo de l'programo. Tiu festo okazos sub la aŭspicioj de la Moresneta urbestraro.

K. Ŝ.

Rumanujo

BUKAREŜTO.

⁂ La ĝisnuna Delegito, S-ro O. Haimoviĉi, pro translogiĝado en Nordhausen-on, eksiĝis el la ofico de Delegito-Konsulo de U. E. A. La nova Delegito estas H. Haimsohn. Esp. Oficejo (estinte en Str Lipskani, 80) de nun ĉe la librejo „ La Gheosdan ", Str. Coltei, 19. La 18 oktobro la Bukareŝta progaga do rondo „ Esperanto ", malfermis novan kurson de Esperanto.

Rusujo.

KRAKOV.

⁂ Societo „ Esperanto " translogiĝis en novan loĝejon, Karmelicka 4, kaj rekomencis siajn laborojn. La Del., S-ro Kuhl, havis du interesajn paroladojn pri siaj impresoj ĉe la „ Kvara ". Dank'al la klopodoj de la grupo la Komerca Akademio enkondukis Esperanton en sian programon. Same en la ŝtata industria lernejo estas baldaŭ malfermita kurso por la lernantoj. La 22an de novembro okazos parolado de S-ro D-ro pastro Krajewski, post kio publika kurso estas arangita. La gazetaro tre favore raportis pri la kongreso en Dresdeno, precipe la alte ŝatata literatura gazeto „ Krytyka ".

TIFLISO (Kaŭkazo).

⁂ En Tifliso ekzistas Societo de Naturamantoj, kiu organizas somere interesajn ekskursojn en diversaj partoj de Kaŭkazo; ĉiulandaj Esperantianoj, dezirontaj partopreni la ekskursojn, bonvolu interrilatiĝi kun Delegito D-ro Andreo Fiŝer (Sudebnaja, 15 — Tifliso).

U. E. A.

Ĉiuj Esperantianoj

nepre devas posedi:

Oficiala Insigno de U. E. A. (beleta verda stelo kun blanka rando). Prezo: ₷ 0,30. — Por **Delegitoj & Subdelegitoj**, speciala insigno: ₷ 0 40.

Oficiala Jarlibro de U. E. A. (Listo de U. E. A — Delegitoj, Vicdelegitoj & Subdelegitoj) Prezo: ₷ 0,16

Oficiala Leterpapero de U. E. A. (100 folioj = ₷ 0,70 afrank — Por **Delegitoj & Subdelegitoj**. kun speciala titolo, 100 folioj = ₷ 0,60)

Oficialaj Kovertoj de U. E. A. (100 kovertoj = ₷ 0,40)

Oficialaj Poŝtkartoj de U. E. A. (100 poŝtkartoj = ₷ 0,70).

Oni mendu tiujn objektojn ĉe:

Esperantio, 8, rue Bovy-Lysberg, **Genevo** (Svisujo).

P. Blaise, Stella Kd. Tooting, **London** (Angl.).

Esperantio, Pl. de la Halle, **Beaune** (Franc.).

Por simplaj membroj oni plenumos nur la mendojn, kiuj estos akompanataj de la necesa monsumo.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — Ĉiu enskribiĝo kostas 30 spesdekojn (fr. 0.75; 7 d.; m. 0.60). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. La literoj P I. montras la korespondadon per poŝtkartoj ilustritaj; la litero L. montras korespondadon per leteroj; la literoj P M. montras interŝanĝon de poŝtmarkoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi senpage sian nomon unufoje.

⁂

Korespondado

Perth (West. Aŭstralia). — S-ro T. H. Cameron, Railwaj accountants office. PI (ĉiuland.).

St Gravenhage (Holand). — S-ro L. Wijnschenk, Jan Blankenstraat 70. PI.

Aïdin (Malgra-d'Azio). — S-ro S. Arzimanoglus, librotenisto PI.

Huy (Bel.). — A. Beaujan, r. St Mengold PM.

Montreuil-s-Bois (Franc.). — S-ino Mercey, 3, rue Carnot. PI. (kun fremd.).

Paris (Franc.). — S-ino Dezirinaota, 15, r. Lebon, (pri virina modo, kun fremdulinoj); S-ro G. Melot, r. de Montmorency, PK, PM.

Sabadell (Hisp. Barcelona). — S-ro S. Mas, St. Ample, 18. PI.; S-ro L. Marat Duran, prof., str. Pedregar, 6 PI.

Censtoĥova (Pol. Rus.). — S-ino M. Wojnoska, 17, Dojazd ul.

Cerveny Kostelec (Bohem. Aŭst.). — S-ro J. Supich, naproti Kosteln, 31. PI. PM.; F-ino J. Supichova, instr PI.

Gorold Bogorodsk (Moskv. gub. Rus.) — S-ro J. Granskij.

Moskvo (Rus.). — S-ro K. Piĥaĉev, Smolenskij bul., d. Miske, kv. 16; S-ro Romanoviĉ, stud., 28, Tverskaja, librejo Esperanto. PI.; S-ro M. Valentinov. Butirskaja, dum Gust. hist. PI.

Gorold Ribinsk (Savosl. Gub. Rus.). — S-ro Mikulŝkij, Krestovaja, 21. PI.

Petoj & proponoj

Korespondantinoj. — S-ro Gelot, 9, rue des Fontaines, Lorient, France, dez. interŝ. kun junaj fraŭlinoj de tutmondo korespondojn kaj seriozajn poŝtkartojn.

Korespondado. — S-ro G. H. Hollis, 13, Horace St., St-Helens (Lancs. Angl.) deziras korespondi *letere* kun horloĝistoj kaj pri politikaj temoj.

Sveda kantaro. — 30 traduk. svedaj kantoj. Prozo: 0,20 ₷; ĉiuj, kiuj *tuj* sendos responkuponon al E. Fiun, Sala (Sved.), senpage ricevos ĝin.

Antaŭ ol akiri domojn, dometojn, kampardomojn kaj ĉiuspecajn bienojn en Italujo, skribu al samideano *L. Scarselli*, via Agnolo, Firenze (Italujo).

Esperantista Hejmo — M. Goérard, 38, r. de la Tour-d'Auvergne (Parizo), je dek minutoj de la Grandaj bulvardoj: gardeno, fortepiano, biblioteko, ludoj, komfortaj ĉambroj. — Moderaj prezoj. Oni parolas Esp., Angle, France.

Katalogo. — Firmo A. Tellini kaj filoj (Belogna, Ital.) aperigos katalogon de ĉiaj ital. produktaĵoj. Oni ĝin petu per ilust. aŭ duobla poŝtkarto.

Ofico. — Neŭtra Moresneto (493 99) S-ro Ch. Schriewer, 19 j., uzanta flue esperantan kaj francan lingvojn, kaj parolanta ankaŭ la germanan, serĉas oficon. Oni sendu la proponojn al la Esp. Konsulo de N. Moresnet.

Papilioj. — S-ro A. Gannier, 4, rue des Lisses, Chartres (E & L., Francujo), deziras interŝanĝi papiliojn el la tutmondo.

Aferistoj. — Profitigaj mondeponoj kontraŭ unuagradaj garantiaĵoj estas perataj de *Hjalmar Bäckström*, Stockholm, c. *Telegrafadreso: Esperanto.*

Komercaj reklamoj

Muziko. — „Esperanto", valso Boston por fortepiano, al la mondo esperantista dediĉita de J. Carredame. — Pr.: 1 ₷ afrankite Mendu al „Klubo Esperantista", Palacio de Bellas Artes, San Sebastian, Hispan.

Silkaj esp. flagetoj. — Sukcese uzataj por propagando. — Prezo: 0,70 ₷ por Franc; aliland: oni sendu 0,30 ₷ respondkupone por 2 specimenoj. Grava rabato por mendo de 50 flagetoj, ĉe S-ro B. Peyraud, 41, rue de la Loire, St-Etienne, Franc.

La ĉapelpingloj por Sinjorinoj esperantistoj kiuj tiom sukcesis dum la Kvara estas aĉeteblaj ĉe S-ro E Gabert, r. Claude-Delaroa, 10, St-Etienne (Loire), Francujo. Prezo: Francujo 60 Sd. (1 fr 50) alilando 66 Sd. (1 fr 65) afrankite. Specialaj prezoj por la vendo pogrande. Oni sendu la monon poŝtmandate.

Rozarbetoj. — Vienne (Isère-Francujo). — S-ro Philibert Moussier, rozkulturisto, rekomencas siajn sendaĵojn tra la mondo, kaj sendos kiel reklamon, poŝtan paketon da 3 kg. enhavanta de 10 ĝis 15 belegajn diversaĵojn de rozarbetoj, po poŝtmandato da kvin frankoj, kosto de l'transporto plie.

La Esp. Librejo, mazowiecka 4, loĝ. 22, Varsovio (Polujo), petas eldonist. kaj komercist. por sendo de specimenoj kaj vendkondiĉoj de ĉiaj propagandiloj kaj komercaĵoj esp.

Komerco. — Firmo por importo kaj eksporto en Italujo. A. Tellini kaj filoj. Bologne, casella postala 12, aŭ Mura d'Azelio, 600.

Hotelo. — Hotel des Trois-Rois (esperantista), strato St Rémy, Meaux (Francujo).

Piedŝvito. — Nepra kuracilo, sendanĝera por la sano. Brissonnet, apotekisto, en Loches (I. & L., Francujo). Poŝtmandata prezo: Francujo, 1 Sm., alilando, 1,20 ₷

Marmoroj. — S-ro R. Richer, en Peruwelz (Belgujo) kaj Fresnes-Nord (Francujo), vendas ĉiuspecajn marmoraĵojn: kahelarojn, kamenojn, altarojn, tombajn monumentojn, k. t. p

---

Standardoj. — Esperantaj kaj diversnaciaj, artikoloj por ornamo kaj iluminado, esper. ŝildoj blazonformaj, kravatpingloj elektraj stelformaj, insignoj, poŝtuketoj, brakbantoj, k. t. p. Oni petu la prezaron. S-ro L. Cuzon, 52, r. de Paris. Charenton (Seine, Francujo)

Silkaj Esperantaj flagetoj. — Taŭgegaj varbiloj kaj propagandiloj uzeblaj por ornamado de Esp festsalonoj Amplekso: 11/16 cent. Prezo: 12 Sd. unu. Speciala rabato al la grupoj kaj Esp.-Oficejoj por mendo de 50 ekz. Haveblaj ĉe S-ro B. Peyraud, 41, rue de la Loire, St-Etienne (Francujo).

Vinoj. — *Vinoj ruĝaj, blankaj kaj maljunaj,* nepre naturaj kaj altgradaj (10 ĝis 18°). Sin turni al S-ro Andreu, *Fourques* (Pyr. O.) France.

Gesamideanoj Rotterdam! — Ĉiuĵaŭde vespere je la 8a, amika kunveno, Granda Hotelo Coomans, Hoofdsteeg. Koran bonvenon al ĉiuj.

Kuraciloj, Drogoj, Ĥemiaĵoj. — Farmaciisto, en Parizo, delegito-konsulo de U. E. A. sin proponas por reprezenti nefrancajn firmojn, kiel deponeja agento. Adr. C. Rousseau, 4, pl de la République, Levallois-Perret (Seine), Francujo.

Reklamo, — S-ro C.-A.-G Browne, reklamagento, 53-54, Wych-Street, London, W. C. (Anglujo), deziras korespondi kun Esperantistoj pri anoncado en britaj, koloniaj kaj fremdaj jurnaloj.

Homoj de internacia kulturo,

amikoj de la justeco kaj paco malamikoj de la mensogo, perforto kaj subpremo, kontraŭuloj de ĉiu fanatikeco kaj ŝovinismo legu kaj rekomendadu la broŝuron:

Slovakoj kaj Magiaroj

kelkaj vortoj pri slovaka suferado en Hungario

de H. K. Bouŝka

Eldonis kaj la mendojn akceptas: *Véna Riegel*, en Praha II-1687, Bohemujo. Prezo 0,21 ₷. Opaj, antaŭe pagitaj mendoj kun granda rabato (grupoj, konsulejoj, k. s., profitu tion): 10 ekz 1,89 ₷., 25 ekz. 4,46 ₷, 50 ekz 8,40 ₷, 100 ekz. 15,75 ₷. 500 ekz. 73,50 ₷

Eldonaĵo popola de

VIVO DE JESUO

de Ernest RENAN

(trad. de Emilo Gasse).

La eldonaĵo popola estas liberigita je ĉio povanta ofendi kristanon. Por tiu verkaĵo nekristanoj agrablege ekkonos kaj ekamos la puran kaj noblan Kriston. — *Tiu libro ne estas teda teologiaĵo, sed rava literaturaĵo.*

Fr. 2,90 afrankite ĉe Emilo GASSE, 77, rue Ernest Renan, Le Havre, ankaŭ mendebla ĉe ĉiu librov-isto, en la mondo.

GRAVA AVIZO AL LA ESPERANTISTOJ

De la firmo ***Louis REYNAUD,*** fabrikisto de **rubandoj, ordenoj, signoj ĉiuspecaj,**

18 & 20, place Jacquard, Saint-Etienne (Loire). France

estas ricevebla afranke, per poŝto rekomendita, kontraŭ mandato aŭ « bon de poste »:

1e Belegan fotografaĵon de D-ro Zamenhof, teksitan sur bela silka rubando kaj enkadrigita kartone, Fr. 2 —.

2e Kordono — Skarpo esperantista, Fr. 2.50

3e Zono esperantista por sinjorinoj (longo 80 cm.), Fr. 1,50.

4e Banto esperant. por butontruo, Fr. 0,75.

Specialaj prezoj por la vendo pogrande.

Ĉiuj petoj pri sciigoj ricevos respondon per revenanta poŝto.

Atentu !

*Estas aĉeteblaj ankoraŭ kelkaj plenaj kolektoj de « **Esperanto** »*

(De No 1 ĝis 42) po 2 ₷ (5 frankoj).

Oni nepre profitu tuj ĉi tiun okazon, kiu baldaŭ ne plu prezentiĝos.

Sin turni al la **Administrejo de « Esperanto »,** *8, rue Bovy-Lysberg.*

VERDA STELO "ESPERANTO"

(déposé — registrita)

la plej bela — la plej malkara — la plej malnova

sole internacia signo esperantista

1 pinglo, broĉo aŭ kravata pingleto: fr. 0,75.
10: fr. 6; 100: fr. 45

(ĉiom afrankite kaj rekomendite)

ĉe **Emilo Gasse,** 77, rue Ernest Renan. Havro (Francujo). — **Deponejoj** ĉe: Belga Sonorilo, — Germana Esperantisto, — Pola Esperantisto, — Esperantisten, — Amerika Esperantisto, — Librejo Esperanto (Moskvo), — Esper. Oficejo (Liverpool), kc.

GALLIOT & DELPIERRE

Marfiŝsendistoj

Boulogne - sur - Mer

Oni korespondas Esperante

Neta enhavo	Delikata kvalito	SPECOJ
1 kg.	1 fr. 75	Rouget -- Dorade grise-
2 kg.	2 fr. 80	Vive - Carrelet - Merlu -
3 kg. 500	4 fr. 50	che-Cabillaud-Anguille-
4 kg. 500	5 fr. 30	Maquereau-Colin. etc.

Afrankite kaj enpakite, en stacidomo.

TOBLER'A

Bonega Svisa Lakta Ĉokolado

* Espero *

kun Esperanto-Ĵurnalo ilustrita,

ĉie aĉetebla

Liverantoj de Mustardo kaj Amelo al la Reĝo

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

(Akcia Societo)

MANUFAKTURISTOJ DE

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON
kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando).

FELIETONO DE "ESPERANTO" 9

LA PATRINO

de **Ernst ZAHN**

(trad. J. Ŝmid, Bern).

« Tion vi ne devas sciiĝi », diras Balbino. Sed kiam ŝi stariĝas, metas tukon ĉirkaŭ la kapon kaj Lene prenas korbeton en la manon kaj surmetas ĉapelon, li tamen scias: « for ŝi kondukas la knabinon, la patrino, por ke li ne plu povu vidi ŝin! » Samtempe li divenas, kien ŝi kondukos ŝin. Al la fratino ŝi iros, malsupren al Erstmatt, al ŝia de la patrino fratino. Georg sufokas pro la peco en la buŝo. Eble naskiĝas honto en li, eble dum momento bedaŭro lin trabrilas, ke estis malagrable hejme, kien li do estis irinta por amuziĝi; sed subite en li ekbolas furiozo, ke ili ne tute tiel agas kiel plaĉas al li, la patro kaj la patrino, kaj... ke ili forprenu ŝin, tiun ĉi Lene.

Sen saluto la virinoj estis forlasintaj ŝtubon kaj domon. La manĝilaron la patrino lasis sur la tablo. Tiel urĝa ŝi estas por forkonduki la knabinon. Georg veneniĝas interne, apenaŭ scias pro kio kaj kiu, pli kaj pli veneniĝas, des pli longe li sidas kaj atentas, ke ili lasis lin sola. Fine li stariĝas, forkuras en trinkejon kaj trinkas dum kolero. Pri forvojaĝo li tute ne plu pensas, kaj kiam li memoras ke li intencis iri morgaŭ, li en si ridegas kolere. Nun nepre ne! Nun nepre li atendos alian ŝipon.

Estas je tagmezo, kiam Balbino ree eniras la vilaĝon Steg tie, kie ŝi estas forlasinta ĝin matene. Lene ne plu estas kun ŝi. Kiel Georg divenis, ŝi kondukis la knabinon al sia fratino en Erstmatt, por ke ŝi tie restu ĝis kiam hejme la aero denove estos pura. Malrapide Balbino paŝas super la sunvarmega pavimaĵo de l'strato, la brakojn kunligitajn sub la brusto, la nigran tukon posten pelitan en la nukon. La suno brilas sur ŝian veston, kaj tiu ĉi ricevas arĝentan brilon, sed la mallumaĵo de ŝiaj okuloj nur des pli akre elvidas el la vizaĝo.

Kiam ŝi preteriras ĉe « Rössli », rido kaj laŭta parolado venas tra la malfermitaj fenestroj de la trinkejo sur la unua etaĝo. Bone ŝi povas ekkoni la ne plu tute certan voĉon de Georg. « Lian adiaŭon li festenas », trakuras ŝian kapon, sed ŝi ne rigardas supren. Kvazaŭ la ridanto tie supre estas iu al ŝi fremda, ŝi daŭrigas la vojon ne vidante kiu ĉirkaŭas la vojon aŭ renkontas ŝin. Sed ŝia pensado estas vigla. Morgaŭ li forveturos, Georg! Adiaŭo por ĉiam tio estos! Kiel iu, kiu ankoraŭ apartenas al la familio, kiel peco de ŝi kaj de lia patro, li pli frue transe estadis, sed nun, kiam li estas forveturinta li estos kiel derompita de ilia vivo, mortinta li estos, la bubo! Balbino havas vizaĝon kvazaŭ ŝi estas malvarma, kaj se ŝi ne estus tiel forta virino, ŝi estus skuata el sia interno, dum ŝi portas sian mizeron tra la stratoj de Steg. Kia li fariĝos, tie transe, se li tiel kondutados? Ŝiaj pensoj ree komencas. Ĉiun konsciencon li perdos: tute nerekonebla li iĝos pro pekemo kaj — tiel senkulpa kiel iu ajn infano li iam kuŝis en la lulilo, la malgranda, blonda homo!

Se la Steganoj scius, kiaj turmentoj frapas la koron de l'virino, kiu trankvile, kun kapo klinita, preteriras!

Balbino ĵus alproksimiĝas al la lastaj dometoj de l'vilaĝo, kiam ŝi vidas veni kontraŭ ŝi knabinon. Tiu ĉi portas disŝiritan robon kaj kapon nekovritan; ŝia kotona presita jako estas tiel trouzita, ke la kolora desegnaĵo ne plus estas videbla. Ekvidinte Balbinon, la knabino surpriziĝas, momenton nedecide ŝanceliĝas, kvazaŭ ŝi pli amas forlasi la vojon, poste ŝi malrapide alproksimiĝas, ankoraŭ duona infano kun boneco, kvazaŭ malfortsenca mieno, sed delikata, pala vizaĝo; ŝi elŝovas brunan hartufon el la frunto kaj ruĝiĝas; direkte ŝi aliras Balbinon, sed kun tima saluto preteriras. Sed Balbino sentas, ke la alia al ŝi volis diri ion, kaj kiam ŝi posten turniĝas, ŝi efektive vidas, ke la knabino haltis nur kelkajn paŝojn post ŝi. Ŝajnas kvazaŭ ŝi batalas kontraŭ timego.

« Ĉu vi ion volis? » demandas la virino.

Aŝvanden-Terezo, la orfino, alproksimiĝas. « Ĉu estus permesite? » ŝi diras mallaŭte kaj timeme, ŝiaj bluaj okuloj estas plenaj je larmoj.

« Kio estas? » Balbino ree demandas.

« Diru... ordonu do... li devas edziĝi je mi... Georg... li devas... li ĉiam ne volas kredi ĝin... sed estas io... ho... »

Ŝi ne devas diri ĉion, eĉ se ŝi povus, ŝi kiu sin sentas malfeliĉega.

Balbino scias ĉion. Dum momento ŝi vaste malfermas la okulojn, poste ŝi rigardas trankvile kiel antaŭe. « Ho, jes, mi ĝin diros al li », ŝi respondas, turniĝas kaj forlasas Terezon, kiu preskaŭ danke postrigardadas ŝin, ĉar, unue, ŝi ne mallaŭdis kiel ŝi atendis, kaj due, ĉar Balbino estas virino, kiu faros, kion ŝi promesis.

Balbino iras hejmen; ŝi spiregas. Ankoraŭ tio! Baldaŭ sufiĉos, baldaŭ!

Hejme ŝi faras sian laboron, ordigas, kie ankoraŭ restis senordo depost matene, preparas la simplan tagmanĝon, kaj dume la pensoj sin ĉasas en ŝia kapo. Ke ŝi ne povas helpi la malfeliĉan Terezon, ŝi baldaŭ scias, almenaŭ ne tiamaniere kiel la alia esperas!; ŝi ĝoju, la almozulino, se li ne edziĝos je ŝi. Ŝi vere estus malfeliĉega. Aliamaniere oni devos zorgi pri si, kiam li nur estos for, nia filo! Kiam ŝi ankoraŭ pripensas la sorton de la delogita knabino kaj decidas, ke ili — Tobias kaj ŝi — konvene helpos la malfeliĉan, ŝia edzo ĵus venas de la laboro por tagmanĝi; li silente eniras la ĉambron, pendigas la ĉapelon ĉe la najlo kaj sidiĝas al la tablo. En la kuirejo, kie ŝi staras, Balbino ĉion povas aŭdi kaj atenti, ke Tobias ne plu estas tiel laŭta kaj libera kiel antaŭe, ke li en paŝo kaj konduto havas ion premitan, timeman, kiel iu timanta mallaŭdojn. Kiam ŝi eniras la ŝtubon, li levas la kapon. « Ĉu li ne ankoraŭ estas ĉi tie? » li demandas duonlaŭte, ĉirkaŭrigardas timeme, ĉu la filo, pri kiu li demandas, ne do jam staras en iu pordo

Balbino neas la demandon kaj sidiĝas kontraŭ li. Ambaŭ atendas iom. Eble Georg do venos tagmanĝi!

« Ĉu li enpakis? » demandas la edzo.

« Ne », diras Balbino.

« Ŝajnas ke li ne ankoraŭ intencas forvojaĝi. »

« En tiu kazo mi iras al la policestro. »

Kiam Balbino diris tion, ili kelkatempon sidadas silente, ĉiu sekvanta la propran pensadon. Poste la edzino rakontas pri la knabino kiun ŝi renkontis.

Ili ne plendas plu, ne sopiras, sed sidas kun sekaj okuloj kaj maldikigitaj vangoj unu kontraŭ la alia, englutantaj mute la komunan ĉagrenon pro la sentaŭgulo; ĉar Georg ne montriĝas, Balbino alportas la supon kaj ili komencas manĝi. Poste la tago, horon post horo, kiel kutime pasas. Tobias ekster la domo laboras, Balbino en ĝi. Ĉe la sama tablo, kie ili tagmeze atendis la filon, la ambaŭ maljunoj ree renkontiĝas vespere. Sed Georg, kiu dum la tuta tago ne montriĝis, ankaŭ nun ne aperas. Kontentaj pri tio ili komencas la manĝadon. Ili nun ĉiufoje facile ekspiras, kiam li restas for, ilia filo.

(Daŭrigota).

Pres. Ch. Zœllner, Genève